## Hungario.

*Mizero en Budapest:* — La antaŭe riĉa Hungario troviĝas en mizera stato. Ne nur ke la pacokontrakto forte malgrandigis la landon: preskaŭ 55 miliardoj da ŝtataj ŝuldoj premas ĝin! En Budapest oni kalkulas 160 mil senlaborulojn; krome 50 mil vidvinojn kaj milit-invalidojn. Oni do povas diri, ke konsiderinda parto de la loĝantaro Budapest'a baraktas kontraŭ la mizero, sen laboro kaj kun nenia aŭ nesufiĉa enspezo!

Dum German-Aŭstrio konstante ricevas vagonojn kun nutraĵoj, vestaĵoj kaj monodonacoj, Hungario ricevis ĝis nun nur kelkajn el Svisio kaj Nederlando.

Ŝuoj por infanoj kostas Kr. 300/500.— po paro: multaj personoj eĉ ne ricevas pli da salajro por unumonata laborado' La urbo faras ĉion eblan por plimalgrandigi la mizeron, sed el 100 mil senŝuaj infanoj nur 15 mil povis ricevi piedvestaĵon, dum la pasinta jaro! La infanoj de inteligentuloj, de oficistoj ktp., ne povas iri sur la straton, ĉar ne estas ŝuoj por ili . . . .

Kaj la nove naskitaj infanoj! En 1919 naskiĝis 19000; por 15000 el ili ne povis zorgi la patrinoj. Mankas ankaŭ vestaĵoj por la infanetoj. Jam en 1918 oni utiligis farunosakojn, kaj hodiaŭ eĉ ili mankas. Feliĉe Svisio sendis amdonacon por 7000 novenaskitoj! Sed 8000 el ili estas volvataj ankoraŭ en papero kaj ĉifonaĵoj! La mizero estas granda, ploriga . . . . Mondo, helpu!